

Numero: 231.
Aŭgusto 2011.

19-a jarkolekto

LITERATURA FOLIO

VESPERTO



Redaktanto:
Apáti Kovács Béla
Kaposvár
Béla király u. 44.
H-7400 HUNGARIO
Telefono: 82/ 410-664
Retadreso: espbela@t-online.hu
Eldonanto: Kaposvara Esperanto Centro
Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet

Lernu filo mia la anglan por ke vi fariĝu perfekta servisto en Anglio!

Konate, ke ni hungaroj ne parolas mondlingvojn. Tial tage kaj nokte oni instigas nin lerni tiujn.

Sed kiujn lingvojn?

Se oni demandas la surstratan homon, ili multnombre respondas, tiu ĉi fremda lingvo estas la angla.

La hungara ministrino pri edukado proponas, en la estonto la eksterlandaj filmoj ne estus dublitaj, ĉar tiel la hungaroj pli rapide ellernos ĉefe la anglan lingvon.

La gepatroj diras al siaj idoj, ke ili lernu la anglan lingvon, ĉar kiam ili serĉos laboron fore de la patrujo tiu ĉi lingvo estos tre necesa. Kompreneble ni devas lerni fremdajn lingvojn, se eksterlandanoj venas al Hungario.

Kiu lernas nian lingvon? Kial por ni hungaroj estas devigita scii la anglan lingvon, se la nian neniu deziras lerni.

La homoj miskomprenas la situacion. Ili pensas, se dum kelkaj jaroj ili lernos mondlingvon, tiam ĉiu lingva problemo solviĝos.

Laŭ mi post multjara lingvolernado ekaperas novaj problemoj. Nur kelkaj lernantoj estas kapablaj perfekte ellerni iun fremdan lingvon.

Eksterlande ili ĉiam estos duarangaj civitanoj, vane ili posedas elstaran diplomon. Nur ofte ili povas rikolti la sukceson. Ili longe devos servi al denaske parolantoj.

Kio estas la solvo? Ĉu en la estonto la patrinoj instru al la bebo jam ĉe la lulilo la anglan lingvon por ke post jardekoj la naciaj lingvoj formortu?

Dio mia, mi petegas neniu faru tion! Anstataŭe ni serĉu pli bonan solvon, kio povos helpi al ni.

Mi tre esperas, se tiu ĉi solvo estos trovita, tiam ĉiu estos lingve egalrajte kaj ni hungaroj ne devos esti servistoj. Krome antaŭ ni ne fermiĝos pordoj.

Certe nun multaj homoj moke diras, ke ĝi estas utopio, ĉar la angla lingvo estos eterne la helplingvo de la homaro.

Ni ne forgesiĝu, en la lastaj jarcentoj kiom da mondlingvoj perdis sian privilegecon en la internaciaj rilatoj.

Kiu kuraĝintus diri en la sepdekaj jaroj, ke en la jaro 2000 la rusa lingvo malaperos el la hungaraj lernejoj.

Nun jam ankaŭ Sovetio estas nur memoro kaj la nova epoko forblovis la rusan lingvon.

Dum la historio okazis multaj similaj aferoj kaj ĉiam venis novaj lingvoj.

Kiu scias eble ankaŭ la angla lingvo estas nur iluzio, ke ĝi povos fariĝi la dua lingvo de la homaro.

Kiel decidi?

-Amiko – komencis mia konatulo – mi ne povas decidi. Kiun lingvon lerni? Ĉu la anglan aŭ la germanan? Nian landon vizitas multe da germanoj. Ja vi scias nia familio havas pensionon kaj ĉiujare ni akceptas eksterlandajn gastojn, ĉefe el Germanio kaj Aŭstrio. Necese scii la germanan lingvon, ĉar la gastoj ne emas ellerni la nian. Verdire mi scias kelke da vortoj kaj esprimoj, sed tio ne estas sufiĉa, ĉar la eksterlanda gasto pretendas, ke ni perfekte sciu sian gepatran lingvon. Mi jam multfoje meditis pri tio, kiam en la pasinta jaro ni pasigis kelkajn tagojn Berlino en la hotelo neniu volis scii la hungaran. Jes mi komprenas, la hungara ne estas mondlingvo. Sur la tuta terglobo ĝin parolas proksimume dekkvin – dekse milionoj da homoj. Ĉu ne? Kion fari? Nenion. Ni devas rezigni, ke la hungara ne estas mondlingvo kaj tial ni hungaroj devas lerni lingvojn. Ni devus ellerni almenaŭ la germanan, anglan lingvojn, sed estus utile, se ni parolus iom ankaŭ iun slavan lingvon. Ho, mi tute forgesiĝis pri la franca lingvo! Ni ne forgesiĝu de tempo al tempo kreskas la nombro de la ĉinoj, kiuj enlokiĝas Hungarion. Vere ili almenaŭ klopodas paroli la hungaran. Dio mia! Kiom ĉarme ili parolas nian lingvon. Malgraŭ tio laŭ mi ni hungaroj devus lerni ankaŭ ĉine. Kiu scias, eble post kelkaj jardekoj aŭ pli frue la ĉinoj ekonomie kaj politike superos ĉiun ŝtaton kaj se ni deziros komerci kun ili, tiam estos necese scii ankaŭ ilian lingvon.

La mondo turnas. Nun la angla estas la populara kaj uzata lingvo, kiu scias, kiu estos la sekva. Estus bone senti, ke la homaro ekfavorigos ankaŭ alian gepatran lingvon, kiu plifaciligas la komunikadon.

Kiun lingvon mi lernu nun? Ĉu la anglan? Bone mi aliĝas al lingvokurso kaj mi ellernos la lingvon de Ŝekspiro, kiel multaj homoj. Sed mi ne scias, ĉu mi estos egalrajta kun la denaskaj angloj, usonanoj, aŭstraloj? Ja ili ensuĉas tiun ĉi lingvon kun la patrinlakto. Ĉu ne? Tio estas tre malfacila demando. Mi timas, ke elektos malĝuste kaj mi vane ellernos lingvon.

Ĉu ankaŭ la germanoj ellernos la anglan lingvon? Mi aŭdis, ke germanoj estas fieraj je sia lingvo, kiel la francoj. Verdire nuntempe la franca ne estas tro populara lingvo en Hungario. En la komenco de la dudeka jarcento ĝi estis la unua. Nun nur kelkaj lernas ĝin. Kvankam ankaŭ ĝi estas mondlingvo, kiel la hispana. Oni diras en Usono disvastiĝas la nombro de la parolantoj de la hispana lingvo.....

Kiel decidi? – Kiu povas helpi al mi?

Vojaĝo al la ĉieloj

Estis granda silento. Li estis sola en la kajuto. Antaŭ li sur la monitoro eldesegniĝis la konturoj de malproksima planedo XB-999.

Li flugis al ĝi per lumrapideco. Dume sur Tero forpasis jarmiloj.

Ĉu ankoraŭ ekzistas Tero, se li volos rehejmeniĝi.

Ekirante li ne pensis pri tio. Li estis festata astronauto, kiu kuraĝe ekiris al nekonata planedo en la kosmo.



Tiam ankoraŭ li ne pensis pri la estonto. La brila adiaŭo blindigis lin. Plaĉis al li la festo kaj la admiro de la homoj.

Li nun jam vojaĝas de post jaroj kaj tiu ĉi monotoneco malrapide muelis siajn nervojn.

Antaŭ li estis la celo. Kio sekvos poste? Li ankoraŭ ne sciis. Vere li ricevis planon, kion fari sur fremda planedo. Se estos trovitaj raciaj estaĵoj, tiam li devos kontakti kun ili. Se hazarde tie ne estos nur ŝtonoj kaj rokoj, tiam lia tasko estos malkovri la planedon kaj estigi tie teran kolonion. Ĝi estos la dua Tero.

Ekscita estis lia tasko kaj li jam malpacience atendis la alvenon.

Kiel pasis la tempo, tiel fariĝis pli granda la planedo.

Li devis prepariĝi al la surplanetiĝo. Lia koro rapide ekpulis. Li jam plurfoje provis sur la Tero la alvenon, sed nun tamen li estis konfuzita.

Iom li timis.

Kio aŭ kiuj akceptos lin sur tiu ĉi fremda, nekonata planedo? Ĉu amikoj aŭ malamikoj?

Li alvenis pli rapide ol li pensis.

La tempo estas relativa. La giganta spaco kunfandiĝis kun la tempo, sed el ĝi li sentis nenion.

Nun ekzistas nur la tempo de la spacveturilo. Sur Tero jam ĉio forpasis kaj sur la vizitota planedo ankoraŭ ne komenciĝis.

Post kelkaj horoj li alvenos kaj antaŭ li malfermiĝos nova vivo. Li ankoraŭ estas sola, sed sur tiu planedo, kiuj atendos lin. Aŭ kio?

Sur Tero oni sciis preskaŭ nenion pri tiu ĉi planedo.

Kion deziras homo sur ĝi tiom fore de la nesto? Por li la tuta vojaĝo estis interesa aventuro. Li ne pensis pri la okazantaĵoj.

Nun li estis ekscita. Ankoraŭ kelke da horoj kaj li enpaŝos novan mondon, kie ankoraŭ homo ne estis.

Li estas la delegito de tre malproksima planedo alportante la saluton de fremda civilizacio.

Ĉu tie ĉi estas raciaj estaĵoj? Baldaŭ li ekscios kaj je sia demando li ricevos respondon.

Sur la ekrano la planedo XB-999 ŝajnis bela kaj pitoreska.

Vastaj, verdaj kampoj estis ĉie. Li ne vidis la signojn de la racia vivo. Belega planedo, sed mankas la racio. Ĉio ege similis al la teraj cirkonstancoj, nur ne estis videblaj urboj, vilaĝoj kaj aliaj.

La tuta planedo estis en praa stato, kiel eble aspektis Tero antaŭ multaj, multaj jarmiloj. Estis interese revidi tiun ĉi momenton, kiam ankoraŭ la homo ne frakasis tiun ĉi belegan naturon kaj ne komencis konstrui gigantajn monstrojn.



Li estas moderna Adamo – li pensis rigardante la ekranon kaj prepariĝis al la surteriĝo – Sed kie estas Evo?

Tio ĉi estis la granda, ekscita demando.

Eble ŝi jam atendas ilin ie sur la planedo XB-999.

Li gajiĝis kaj apenaŭ atendis, ke surpaŝu la surfacon de la planedo.

Li forlasis mondon, kie estas nur ĥaoso kaj hororo. Espereble tie ĉi estos pli bona vivo.

Evo jam atendas lin.

Ili generos idojn kaj ili enloĝigos tiun ĉi belegan planedon. Ili kreos mondon, kie estos nur paco kaj trankvilo. La ĉi tieaj homoj ne konos la perforton kaj la militon. Ili vivos en harmonio unu kun la alia. Ĝi estos la nova Edeno de la estonta homaro.

La kosmoŝipo alvenis la planedon senprobleme. Ĉio estis en ordo. La instrumentoj ne signis danĝeron. La vivkondiĉoj estis teraj. Li povis elpaŝi el la kosmoŝipo sen skafandero.

Li survestis elegantan, someran vestaĵon, kvazaŭ li nur estus iranta al plaĝo. Li kunportis nenion. Ĉion li lasis ene, ĉar li tute volis forgesiĝi pri sia antaŭa vivo.

Nun komenciĝas tute nova kaj Evo ie atendas lin. Apenaŭ li atendis la renkontiĝon por ke li povu ĉirkaŭbrakumi la virinon.

Surpaŝante la planedon li laŭte ekkriis:

-Evo, kie vi estas?

-Apáti Kovács Béla-

Poezio

John S. Dinwoodie

Soleco

Ŝafisto iras sur montaro,
kie birdkantoj sonas;
kun la Natur' en solidaro
solecon li ne konas.

Sed iras mi sur urbostratoj,
kie la bru' senĉesas;
kaj meze inter la homfratoj
fremdule mi solecas.



Ivan Naumov
Babelo

Donu al mi fabelon,
Ĉar io almenaŭ restu,
Ĉar io almenaŭ nestu
En pingloza arbusto
de mia obskura anim'...
Kiam oni eniros Babelon
Ĉies vinoj restos sen gusto
Kaj ŝimos en ŝlim'.

Donu al mi intencon
Por io ankoraŭ tremu,
Por iun ankoraŭ emu
Longaj ŝtonaj strataroj
de mia vintroza intern'.
Kiam oni deklaras komencon
Ĉies varmo restos sen tegoj
En frosta kavern'.

Donu al mi nenion
Laŭ jam forgesita moro.
Laŭ jam forgesita foro
Eble glitos ombraro
de mia neĝoja esper'.
Kiam oni ektrovos la Dion
Ĉies dioj restos sen faro
Kaj mortos sur Ter'.



Mikaelo Bronŝtejn
Tambura tango

Estis nia printemp',
Fajra vivo en tendoj,
Reciproka subten'
Kaj atendoj, atendoj...
Horizont' en real'
Nian marŝon nur randis
Nia juna batal'
En la voĉoj paradis.

Vokis min violonoj, feste flutoj aklamis,
Unuecaj kolonoj en marŝado ekflamis.
Inter la naskiĝanta gitarista kulturo –
Ankaŭ mi – kun tamburo.

Tamen, estis la voĉ',
Mi memoras ekzakte,
Ke en nia diboĉ'
Frapas mi ne entakte.
Sed en ŝat' aŭ malŝat'
La tamburo subtila
Por komuna marŝad', por komuna marŝad'
Estis, certe, utila.

En aero-aromo sonis vok' hipofea, –
Iu marŝis ĉe domo kun edzino trofea...
Inter akra avido, inter dolĉa murmuro –
Ankaŭ mi – kun tamburo.

La ĉefurba motiv'
Estis loge karesa.
Cedis mia naiv'
Al la tango promesa.
Ekis li en fervor'
Kun la rozo en dentoj...
Daŭris marŝi en for', daŭris marŝi en for'
Ni kun niaj atendoj.

"Kruza marŝo soldata jam eliris el modo
Por la tango amata venis nun periodo!" –
Staris bonaj amikoj kun ampleksa seruro,
Ankaŭ mi – kun tamburo.

La plej norda provinc'
En blizardoj nin lulas.
Mi feliĉas pro vin'
Kaj nemulton postulas.
Fortamburis la jun',
Vekis novan futuron.
Kovras polva katun', kovras polva katun'
La fidelan tamburon.

Sed en sonĝo mi aŭdas milpiedan paŝadon,
Kaj l' animo alaŭdas sekvi l' venkan paradon.
Iri kontraŭ la vento kaj balanci sur ŝnuro
Prenu min kun tamburo!

Por infanoj



La onklo adalberto

Diablido

Mi havis malgrandan amiketon, kiu ĉiam malbonadis. Li ne povis sidi trankvile hejme, kiel aliaj geknaboj.

Lia avinjo nomis lin diablido.

Vane oni petis lin, ke li estu bona knabeto. Li ĉiam promesis tion, sed en la sekva momento li jam forgesiĝis pri sia promeso.

Nun mi rakontas al vi lian lastan malbonaĵon.

En iu somera posttagmeze la diablido enuis hejme nenionfarante. Li sidis sub la pomarbo en la angulo de la ĝardeno. La avino forestis en la najbaro kaj babiladis kun la najbarino.

Blanka kato venis en la ĝardenon kaj ĝi kuŝiĝis proksime al li. Unue li ne rimarkis la katon, sed la besto enuis la kuŝadon kaj scivole iris al la knabeto.

La diableto ankoraŭ ne vidis ĝin. Certe ĝi loĝis ie en la najbaro aŭ iu forpelis el la domo kaj ĝi nun serĉas hejmon. Ĝi estis tre amikema kaj timis de neniuj. Ĝi lasis karesadi sin. La kato ne kontraŭis, ke la knabeto metis ĝin en sian sinon.

Kiel la diablido karesadis la katon venis ideo. Li decidis, ke la beston li fermos en la domon de la hundo. La fidela besto ripozis en la florigardeno kaj ĝi ne vidis, kion faras la knabeto.

La kato estis portita al la hundodomo kaj ĝin li fermis tien. Ĝian pordon li baris per lignolameno kaj la malfeliĉa kato ne povis elveni. Certe la lerta musokaptanto, ke li nur ludas kun ĝi kaj baldaŭe ĝi povos liberiĝi. Vane li atendis longe, la diablido ne malfermis la hundodomon, eĉ li venigis la hundon:

-Bodri! – (tio estis la nomo de la besto) – Kie vi estas hundeto mia?

Kelkfoje li ripetis ĝin kaj atendis. Apenaŭ pasis kelkaj minutoj baldaŭ la maljuna dombesto ekaperis.

Ĉiu scias, la hundoj estas malamikoj al la katoj. Ili ne ŝatas unu la alian. Ekde la komenco de la mondo la hundo kaj la kato konstante militas. Ĉefe la hundoj preferas peli la musokaptantojn, kiuj por savi la vivon plej ofte kuregas superen sur la arbon kaj de tie ili blovas furioze al la hundo.

Bodri ne sciis, kio atendos ĝin. Eble ĝi pensis, ke ĝia eta mastro donos grandan medoloston, kiel tiom multfoje.

Sed nun ĝi ne atendis la hundon. La diablido gvidis ĝin al ĝia domo kaj diris:

-Mia kara hundeto, ĉu vi scias kio estas ene? Baldaŭ vi ekscios. Vi havas gaston. Mi petas vin, bonvolu gastigi ĝin dece!

La hundo ne komprenis, kion deziras de li la knabeto. Ĝi nur svingadis sian vilan voston kaj ĝi rigardis al li, kvazaŭ ĝi demandus per siaj grandaj okuloj:

-Kara mastro mia, kion vi elpensis denove?



El ĝi la knabeto komprenis nenion. Li malrapide malfermis la pordon de la hundodomo kaj li atendis scivole.

La maljuna hundo eniris, certe ĝi esperis, ke ene ĝi trovos bongustan oston aŭ alian. Sed ĝi devis trompiĝi. Tie estis tremanta kato, kiu unue blovis al ĝi kaj deziris liberiĝi el la kaptilo.

Nun certe ĉiu pensas, baldaŭ granda batalo komenciĝis, ĉar hundo kaj kato ne ŝatas unu la alian.

Ankaŭ diablido tiel pensis, kaj jam li antaŭĝojis al la grandioza kato-hundo milito.

Li atendis kaj atendis. Vane. pasis minutoj, sed nenio okazis.

Li enrigardis la hundodomon kaj mire li devis konstati, la hundo interamikigis kun la kato kaj ili pace kuŝas unu kun la alia.

Tio tre kolerigis lin. Lia ŝerco ne sukcesis. La hundo kaŭzis al li trompiĝon kaj ĝuste li deziris puni ambaŭ bestojn, kiam avinjo ekaperis grumblante.

-Kion vi elpensis denove nepetĉjo mia? Hontu! Kial ĉagreni ĉiutage tiujn ĉi karajn bestetojn?

La diablido ne povis respondi al la avinjo. Li hontiĝis kaj enkuris la domon.

Ne pensu, ke li pentis sian agon! Eble tial li forkuris, por ke li elpensu novan malbonan aferon.

La avinjo ridetante ekiris post li.

Se mi ekscios, kion elpensis diablido, tiam mi rakontos al vi venontfoje, se ni renkontiĝos. Ĉu bone?



INTERESAJ BILDOJ

